# *E*speranto-*N*umismatika *A*socio



**Esperanta Numismatiko** 2018 **Jarkolekto 5 - Numero 1**







# *E N H A V O T A B E L O*

## de januaro 2018

Titolpaĝo ………………………………………………...…………....  1

Enhavotabelo ……………………………………………………….  2

De ni por … ni ………………………………………………….......  3

Moneroj & medaloj ……………………………………………….  4

*Internacia Lingvo Esperanto 80 - jara*

*Medicina Esperanto - Renkontiĝo 1977*

*19a Germana Esperanto - Kongreso Dresdeno*

*22a Kongreso de TEJO*

Spikumaĵoj & suplementoj …………………... ……………......  11

Por spuremuloj ! ………….…………………………………….….  13

Aspektoj de numismatiko: emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj? (2)….  15

Medalistoj ………………………………………………………..….  16

11. Mag. H. Andexlinger (°1973) kaj mag. W. Klag (°1949)

Historiaj aspektoj: pioniroj de la esperanta numismatiko …………….  17

A. René de Saussure

Terminaro: alfabeta listo (12) ………………………………….……  21

El la gazetaro ……………………….………………………….  22

Retpoŝto ……………………………………………………….  23

Anoncoj & eventoj ……………………………………..….….  31

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts bert.boon@skynet.be

Provlegado: Jozefo Horvath www.esperanto.es/biblioteko

Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon! www.kolektado.esperanto.cc

Finredaktoro: Bert Boon

# *DE NI... POR NI!*

Saluton, geamikoj de la esperantaj numismatiko kaj historio! La redakcio invitas vin esplori la unuan numeron de la kvina jarkolekto de “Esperanta Numismatiko”. Jes, vere jam la kvina!

Unuavice ni volas kore danki tiujn, kiuj afable reciprokis la bondezirojn, kiujn ENA sendis okaze de la nova jaro al ĉiuj individaj membroj, al la UMEA-membraro kaj al la anoj de aliaj aliĝintaj asocioj.

La plimulto de la ĉi-numeraj kontribuaĵoj klare montras, ke por ENA unu el la pli valoraj kaj rimarkindaj eventoj de la nova jaro estas la eldono de speciala, brila arĝenta 100-stela pagomedalo, produktita de Münze Österreich AG, filia kompanio de Aŭstria Nacia Banko. Tio nur povis esti realigita dank'al la privataj iniciativo kaj engaĝiĝo de nia membro mag. Walter Klag el Vieno. “Nur” 1000 ekzempleroj estis emisiitaj! Prezo inkluzive sendokostoj: 59 eŭroj.

Evidente ni prilumas la pioniron sur tiu medalo, kiun ni nepre konsideru kiel la “patro” de la esperanta numismatiko: René de Saussure. Lia nomo troviĝas omaĝe sur la nova medalo, por ke la estontaj esperantujanoj neniam plu forgesu liajn meritojn por la internacia kulturo!

Ankoraŭ pli agrabla estas la anonco, ke -*se la unua estos sufiĉe abunde aĉetata*- tiu belega numismatikaĵo ne estos la nura, sed la unua el kvin, kiuj montros la gravan rolon, luditan de famaj pioniroj pri numismatiko dum epoko, kiam ankoraŭ ne estis parolata pri “esperanta numismatiko”, eĉ ne en Esperantujo mem!

Ni sekve daŭrigas prilumi ne-metalajn medalojn kiel aspekto de esperanta numismatiko, kiu emfazas, ke -ankaŭ dum periodoj de inflacio kaj manko de financoj- esperantistoj ne ĉesas eldoni medalojn. Ni komentas la ecojn de diversaj specoj de *argilo* kaj tiurilate klarigas la signifon de aliaj novaj terminoj, kiel *vazaro*, *fajenco*, *grejso*, *porcelano*, *keramiko* kaj *kaolino*.

Ni kompreneble ne povas ne anonci al vi  la 103an Universalan Kongreson, ĉi-jare okazonta en Lisbono, ĉefurbo de Portugalio, de la 28a de julio ĝis la kvara de aŭgusto. Tie, kiel en Lilo, esperantaj filatelistoj (ELF-AREK) kaj numismatoj (ENA) gefrate kunlaboros dum la foiro. Ambaŭ fak-asocioj krome invitos ĉiujn membrojn kaj interesulojn kunveni dum la kongreso, por konatiĝi kaj interparoli pri siaj ŝatokupoj. Detalojn kaj precizajn datojn ENA anoncos en la dua numero de 2018, kiu aperos je la fino de aprilo.

Mi tre volonte dankas ĉiujn kunlaborintojn kiuj iel kontribuis al la kompilo kaj dissendo de ĉi-nova numero de “Esperanta Numismatiko”. La redakcio ĝojus ekscii, ĉu la enhavotabelo incitis vian scivolemon, por rigardi la ilustraĵojn kaj legi (kelkajn) kontribuaĵojn. Kaj eble vi eĉ sentos instigon spuremuli, por klarigi kelkajn enigmojn de nia esperanta numismatiko!

Bert

# M O N E R O J & M E D A L O J

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

### Internacia Lingvo Esperanto 80 - jara







| | |
|---|---|
| Lando: nekonata | Kvanto: nekonata |
| Materialo: argilo | Pezo: 51,08 g |
| Diametro: 72 mm | Medalisto: nekonata |
| Jaro: 1967 | Diko: 12 mm |

***Averso:***

Busto de Zamenhof kaj ĉirkaŭa teksto: “L.L.ZAMENHOF 1859 - 1917”

***Reverso:***

Fone: terglobo

Antaŭe: granda stelo en flanka perspektivo

Ĉirkaŭe: “INTERNACIA LINGVO ESPERANTO 80 JARA”

Sube: “ - 1887-1967-”

***Rimarko:***

La originale griza surfaco (vidu la makuletojn!) ricevis bronzkoloran tavolon.

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Medicina Esperanto - Renkontiĝo 1977








Lando: Hungario

Materialo: grejso

Diametro: 81 mm

Jaro: 1977

Kvanto: nekonata

Pezo: 53,2 g

Medalisto: OA (?)

Diko: 5 mm

***Averso:***

En centra disko:

-Fone (profunde): esperanta stelo

-Meze: tre probable kandelo; antaŭ ĝi figuro, simbolo de kuracisto, kun disetenditaj, ŝirmantaj brakoj; horizontala rubando kun vertikalaj strietoj

Surskribo: HÓDMEZŐVÁSÁRHELY ·1977·

En bendo ĉirkaŭ la disko: " · MEDICINA ESPERANTO RENKONTIĜO · " + $^{O}{}_{A}$ 77

***Reverso:***

Fluganta pacokolombo kun laŭra branĉo en la beko. Sen surkribo!

***Rimarko:***

**Hódmezővásáhely** estas - laŭ loĝantaro - la due plej granda urbo de la hungara departemento Csongrád kaj la due plej granda urbo de Hungario laŭ areo.

Somere de 1979 tie okazis la dua "Internacia Medicina Esperanto-Konferenco" kaj la unua "Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj". Ĉu tiam kaj tiuokaze jes aŭ ne aperis memoriga medalo - kiel en 1977 - ankoraŭ ne estas konata al nia redakcio.

La urbo mondvaste famiĝis pro la artefaktoj el la potfaristaj laborejoj. La famo de tiuj ceramikistoj estas senĉese daŭrigata en la urba *majoliko*-fabriko. Tre verŝajne la ĉi-priskribata medalo el 1977 estis tie fabrikita.



Terakotaĵaj muzeo kaj laborejo "Belvárosi Fazekasház". Parto de la permanenta ekspozicio.

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

### 19a Germana Esperanto - Kongreso Dresdeno




| | |
|---|---|
| Lando: Germanio | Kvanto: nekonata |
| Materialo: porcelano | Pezo: 9,34 g |
| Diametro: averse 37 mm<br>reverse 37,9 mm | Medalisto: nekonata |
| Jaro: 1930 | Diko: 4 mm |

### *Averso:*

Meze: globo kaj antaŭ ĝi delikate, elegante kaj zigzage drapirita rubando kun teksto:

"★ 19A GERMANA ★ *ESPERANTO-KONGRESO* ★ DRESDEN 1930 ★"


### *Reverso:*

Meze: centra parto de la frontispico de la dresdena "Zwinger"-palaco, la tiama kongresejo. La jarindiko "1930" estas dividita ambaŭflanken de la bildo. Sub la bildo: komerca simbolo (signo) de la mondfamega porcelanfarejo de Meißen [majsen]. Iom enigma estas la punkteto en la mezo inter la sabroj (vidu ankaŭ rimarkon tri!). Eble ĝi estas parto de la centra bildo…


## *Rimarko 1:*

La medalo estas okangula.

## *Rimarko 2:*



“Zwinger-palaco”, la kongresejo en 1930 sur poŝtkarto el la sama jaro.




La emblemo de la germana kongreso 1930.

## *Rimarko 3:*

Ĉi-aldonita bildo montras la reverson de neesperanta, samkolora porcelanmedalo el la sama jaro 1930 kun la (samaspekta) signo de la fabriko de Meißen, kiel centra bildo. Tamen, kiel kutime, sen punkteto inter la sabroj!



## Tipo D 2 – (Unuflankaj) (mur)medalionoj

# 22a Kongreso de TEJO






| | |
|---|---|
| Lando: Hungario | Kvanto: nekonata |
| Materialo: argilo (fajenco) | Pezo: 235,30 g |
| Mezuroj kahelaj: averse :116x115 mm | Diko kahela: 15 mm |
| reverse: 120x120 mm | medala: 20 mm |
| Jaro: 1966 | Medalisto: nekonata |
| Koloroj: blanka / blanka-bruna | Diametro medala: 110 mm |

### *Averso:*

Fone: la norda parto de terglobo kun meze verda steleto kun blanka E.

Antaŭe: perspektiva bildo de la frontispico de la kvartura baziliko de Sanktaj Petro kaj Paŭlo en la urbo Pécs.

Sube: cirkla segmento kun teksto: “22 · KONGRESO DE·TEJO·PÉCS 1966”

### *Reverso:*

Supre: truo por pendigi la murmedalionon.

### *Rimarko 1:*

TEJO = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

### *Rimarko 2:*

*Fajenco* estas ceramikaĵo glazurita per netravidebla blanka tavolo por similigi ĝin al ĉina porcelano. Ankaŭ uzata por kaheloj, kiel por ĉi tiu medaliono. La bruna koloro reverse montras, ke la materialo estas bakita argilo.

### *Rimarko 3:*

La suba nuntempa foto montras la bazilikon de la Sanktaj Petro kaj Paŭlo en Pécs.



# *S P I K U M A Ĵ O J & S U P L E M E N T O J*




El scienca vidpunkto kaŭzas konfuzon la konstato, ke de tiu medalo el **1912,** *tamen sen jarindiko*, ekzistas almenaŭ unu (eble nur unu) ekzemplero **kun la jarindiko 1908** ("SENS JUIN 1908")! Laŭstile tiu indiko ŝajnas profesie kaj teknike perfekta gravuraĵo per la samaj literotipo kaj tekniko kiel la alia, gravurita (tamen same enigma!) vortgrupo "FRIQUE ATLANTIQUE", legebla sur ĉiuj konataj ekzempleroj. Kiam, kial kaj de kiu tio estis aldonita? Kiu grava evento (publika aŭ privata) okazis en junio 1908 en la franca urbo SENS?

Tial kontrolendas, ĉu la medalo vere estis eldonita en 1912. Nia membro Hans Jankowski en sia broŝuro "ESPERANTO MEDALOJ 1912 - 1995" sur paĝo kvin mencias, ke la medalo estis "eldonita en la jaro 1912 de la franca Esperanto-gazeto La Movado." Ĝi estis monata, universala gazeto (propaganda, informa, komerca ktp), presita en Parizo de 1910 ĝis 1914 kaj de 1923 ĝis 1933. Tamen nek en la 1911a jarkolekto, nek en tiuj de 1912, 1913 kaj 1914 troveblas la supre montrata anonco… Okazu do iam esplorado pri la periodo 1923-1926!

La anonco tamen aperis en "La Movado" (lastfoje) en 1927, en la deka jarkolekto. Do Jankowski prave diris, ke "la medalo estis ofertita al vendo ankoraŭ en la jaro 1927".

Provizora konkludo estas ke tiu medalo ne estas la (nura) pli malnova medalo, dediĉita al la "Majstro", kiel supozis Jankowski. La jarindiko 1908 sur unu (?) ekzemplero do povus esti anakronismo! Provizore tamen ne disponeblas konvikta klarigo pri tiu eventuala anakronismo.

*Vidu ankaŭ la 5-an enigmon en la aktuala rubriko "Por spuremuloj" kaj la unuan numeron de la unua jarkolekto, por pli detala priskribo de la medalo kaj diskutadoj en "Retpoŝto"!*



204 LA MOVADO

ĴUS APERIS : .

**Esperanta Komerca Korespondo**

de D-ro Emil PFEFFER

Komercistaj modelleteroj en Esperanto pri la plej gravaj okazaĵoj de l' negoca vivo kun akompananta germana teksto kaj fakaj klarigoj.

92 paĝoj — Prezo : RM. **0,50**

DE L' SAMA AŬTORO :

**Esperanto en 10 lecionoj** (lernolibro por Germanoj) RM. 0,25
**Unua Esperanta legolibro** . . . . . . . . . . . RM. 0,25
**Vortaro Esperanta-Germana** . . . . . . . . . . RM. 0,25
**Vortaro Germana-Esperanta** (30.000 tradukoj) . RM. 1, »
**Ĉu vi parolas Esperante?** (Enkonduko en la Esperantan konversacion) . . . . . . . . . . . . . RM. 0,25

Prezoj en germanaj markoj.

Postulu senpagan prospekton kun prov-paĝoj de

**Tagblatt-Bibliothek, WIEN I, Wollzeile 22 (Aŭstrujo)**

**G. PAIN**

JUVELISTO

Poŝhorloĝoj de gravaj markoj
Artikloj laŭmende fabrikataj
Plej belaj juveloj
Elektraj horloĝoj

**54, Avenue de Clichy, PARIS-18e**

Tel. : Marcadet 16-72 Esperanto parolata

**LA "LINO"**

La **LINO** estas malgranda manpresilo por fari per si mem, sen speciala lernado, la plej diversajn presaĵojn, per presliteroj aŭ fanditaj linioj, aŭ kliŝaĵoj, sur papero, sorbpapero, kartono, teksaĵoj, moleskino, laŭ unu aŭ pluraj koloroj, je la rapideco de 500 ĝis 800 ekzempleroj pohore.

Jen kelkaj referencoj :

Vicministerio de l' P. T. T., Fabrikejo de Aeroplanoj Voisin, La Movado, Centra Esp. Librejo, k.t.p.

Inkoŝmiro laŭ ĉiuj koloroj (inko kaj rubando)
**Literoj** francaj, alilingvaj, **esperantaj**
kaj **Akcesoraĵoj por ĉiuj Presmaŝinoj**

*Petu la ĝeneralan katalogon 1926-A, citante* La Movado'*n kaj aldonante unu frankon per poŝtmarkoj, de*

**CINUP, 34, rue de la Saussière, BOULOGNE (Seine), Francujo**

(je 5 minutoj de la pordo St-Cloud, Paris) **Tel. Boulogne 967**

Bonegaj Bombonoj el ĉokolado

**DEBAUVE & GALLAIS**

**30, Rue des Saints-Pères, PARIS (7e)**

**ĴUS APERIS**

**VORTOJ de Profesoro Th. CART**

La plej grava prilingva verko aperinta en la postmilita epoko

En neniu Esperanto-Biblioteko devas manki tiu grava libro

Prezo : por niaj abonantoj, Francujo : Fr. 11,50
Alilando : fr. fr. 13

Ĉe LA MOVADO. Poŝtĉeko 708.95

**MEDALO de ZAMENHOF**

**kaj ESPERANTO**

**Prezoj :**

| | | |
|---|---|---|
| Bronzo florentina | Fr. | 7 25 |
| — arĝenta | — | 10 05 |
| — orumita | — | 12 85 |
| Arĝento | — | 62 50 |
| Orarĝento | — | 70 » |
| Aldoni por la sendkosto (Francujo) | — | 1 50 |

Ujo : Fr. fr. **3,05**, **7,85** aŭ **10,30**, laŭ kvalito.

**Sin turni al "LA MOVADO"**

Antaŭa flanko

Posta flanko

Paĝo 204 el la jarkolekto 1927 de la franca gazeto "LA MOVADO"

# *P O R   S P U R E M U L O J !*

*En la arkivoj de ENA troviĝas fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ malmulte aŭ preskaŭ nenion.*

*Tial ni kreis la rubrikon "POR SPUREMULOJ". Multaj kapoj scias pli ol unu kaj multaj okuloj vidas kaj legas pli ol nur unu okulparo. Do ni petas vin atenti kaj dise observi, eĉ spioni kaj spuri kiel kutimis Hercule Poirot kaj Sherlock Holmes…*

*Ni anticipe dankas vin!*

***4a enigmo***




En ĉi-numero ni montras kaj priskribas la supran medalon sur paĝo kvar, sed mankas informoj pri la lando kaj la medalisto-gravuristo. Krome pri la eldonkvanto (tre ofte ne solvebla problemo rilate al medaloj!).

La montrata ekzemplero estis vendita de israela komercisto, sed ĉu ĝi jes aŭ ne estis eldonita en Israelo, restas provizore nekonata. Diversaj inform- kaj helpopetoj senditaj al israelaj UEA-delegitoj restis tute sen respondo!

***5a enigmo***







Sur ĉiuj konataj ekzempleroj troviĝas la iome vertikala, enigma epigrafo "FRIQUE ATLANTIQUE". Nur sur **unu ekzemplero** estas krome horizontala epigrafo "***SENS JUIN 1908***". Tio jam instigis viglan, interesan sed provizore vanan diskuton en sekvaj "Retpoŝto"-j de la 1a kaj 2a jarkolektoj. Sendube ĝi estas ĝis hodiaŭ la plej enigma medalo en Esperantujo!



Antikva vazaro en bakita argilo



Argiltabuloj kun listoj aŭ tekstoj




Argilaj medaloj el diversaj epokoj

# Emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj? (2)

## C. Aliaj ĉipaj alternativoj

*En la unua seriero, en la antaŭa numero, ni jam menciis sub B originalan solvon por eviti altajn prezojn, kiuj estas pagendaj por grandaj kvantoj da medaloj, kutime pregitaj en nerustantaj,noblaj metaloj aŭ en bronzo. Tamen ne grandnombraj estas la personoj kiuj kapablas mem krei kaj manufakture fabriki medalojn, eĉ ne en etaj nombroj!*

1. Panjo Tero liveradas al la homaro jam dum pli ol 20.000 jaroj (la plej antikvaj objektoj estis elfositaj en Ĉinio) substancon, kiu ne nur ebligas krei ĉiutagajn, necesajn objektojn, sed krome stimulas talentplenajn personojn krei artaĵojn. Tiu mirinda substanco estas *argilo*. Por la kruda speco oni ĝenerale uzas la terminon argilo, por la pli delikata la vorton *fajenco*.
   *Vazaro* estas la kolektiva nomo por argila ceramiko bakita je temperaturoj ĝis preskaŭ 1100 gradoj (Celsio), kiel teleraro, potoj, pladoj, pokaloj, kruĉoj kaj eĉ kaheloj. Numismatikaĵoj - kiel medaloj - en tia materialo ekzistas, tamen estas relative malmultaj kaj maloftaj.
   Ceramikaĵoj estas pli molaj kaj malpli solidaj ol *grejsaĵoj* aŭ *porcelanaĵoj*, sed ili estas multe pli facile kaj ĉipe fareblaj. Pro ĝia poreco *ceramiko* tamen preskaŭ ĉiam estas glazurenda. Ceramikon oni nur nomas *grejso* se ĝi estis bakita je temperaturoj de pli ol 1200 gradoj. Taŭga argila speco por tiaj objektoj estas *kaolino* (Angle: China-clay), tre delikata speco de argilo, kiu blankiĝas dum la bakada proceso.
   Vazaro por ĉiutaga uzado estas rezulto de fabrikado el argilo aŭ lomo, tre ofte trovataj laŭlonge de riveroj (ŝlimo). Post sekigado la objektoj estas bakataj kaj tiel duriĝas. Pro la altaj temperaturoj ili rezistas kontraŭ moligo kaŭze de fluidaĵoj.



Potfarista forno el la gaŭl-romia epoko, elfosita en Tienen (Belgio) en 1998

Daŭrigota

# M E D A L I S T O J

## 11. Mag. Helmut Andexlinger (°1973) kaj mag. Walter Klag (°1949)

Mag. Helmut Andexlinger gvidas ekde 2016 la gravuristan sekcion kaj estas ĉefgravuristo de Münze Österreich AG. En la aŭstria urbo Steyr li sukcese trapasis la gravuristan instruadon. Poste li studis komunikado-sciencon en la Viena Universitato. Unu el liaj plej grandaj sukcesoj estas la dezajno de la 2-eŭra monero 2012 (vidu la foton dekstre), kiu cirkulas en 17 landoj. Li gajnis en konkurso kontraŭ 800 aliaj partoprenantoj.



Li regule uzis la metalon *niobo*, kiel kerno de multaj eŭro-moneroj en arĝento. En 2003 Münze Österreich unue pregis du metalajn monerojn konsistantaj el arĝento (90 %), kupro (10 %) kaj kun kerno de 7,15g da niobo. La “Plansee Holding AG” perfektigis metodon por kolorigi la nioban kernon per anoda oksidado. La kolorefekto dependas de la diko de la oksida tavolo. En Aŭstrio tiaj moneroj normale cirkulas, en la cetera eŭro-regiono ili estas ĉefe objektoj por kolektantoj. Ankaŭ la ĉi-sube montratajn monerojn kreis Helmut Andexlinger.













Mag. Walter Klag kunlaboris kun Andexlinger por dezajni ĉi-memormedalon. Li estas ENA-membro kaj fakdelegito pri numismatiko. Iniciatanto de projekto, kiu celas eldoni kvin specialajn medalojn, por honori pionirojn de numismatiko, kiuj provis krei internacian monunuon surbaze de E°.




Kiel infano Walter posedis kelkajn “nevalorajn” monerojn, ekzemple kupran “Heller” el 1759, sed li ne havis monon por aĉeti pliajn. Esperanton li lernis en 1984, sed nur en 2015 li eksciis, ke ekzistas esperanta numismatiko. Kun bedaŭro li konstatis, ke la lastaj stelo-moneroj aperis en 1965. Por daŭrigi la tradicion, li decidis eldoni 100-stelan specialan medalon.



# PIONIROJ DE ESPERANTA NUMISMATIKO

## A. **René de Saussure**: 150a naskiĝdatreveno (1868-1943)

### Tipo A 1 – Esperanto-medaloj







| | |
|---|---|
| Lando: Aŭstrio | Kvanto: 1000 |
| Metalo: arĝento (brila) | Pezo: 31,1 g |
| Diametro: 37 mm | Medalisto: Helmut Andexlinger |
| Jaro: 2018 | Dezajnistoj: Helmut Andexlinger |
| Diko: 4mm | kaj Walter Klag |

***Averso:***

Ĉirkaŭskribo: “1887 · ESPERANTO · 2018   RENÉ DE SAUSSURE 1868-1943”

Supre- meze: esperanto-stelo. Dekstre kaj maldekstre: jubilea simbolo 1987

Sub la stelo: KLAG WIEN   “CENT STELOJ”

***Reverso:***

Arkforma skribo: “1887 · ESPERANTO · 2018”

Meze: super dika streko: “100 STELOJ”

Sube: “UNU UNCO DA PURA ARĜENTO 999” + 2 respondecosignoj de Münze Österreich + titro

### *Rimarko 1:*

Iniciatinto, kundezajnisto kaj eldonisto: Mag. Walter Klag, Vieno, Aŭstrio**,** *membro de ENA*.

### *Rimarko 2:*

Pezo: 1 unco da arĝento 999/1000 (31,1 g).

### *Rimarko 3:*

Ambaŭ flankoj havas perlorandon.

### *Rimarko 4:*

Produktisto: Münze Österreich AG, Wien 3, Am Heumarkt 1, muenzeoesterreich.at
Münze Österreich AG estas filia kompanio de Aŭstria Nacia Banko.

### *Rimarko 5:*

"Stelomoneroj" uziĝas dum internaciaj aranĝoj. Tamen oni prefere ne parolu pri monero (=oficiala pagilo), sed pri "speciala medalo" . Vidu: de.wikipedia org/wiki/stelo.

### *Rimarko 6:*




La signo A en cirkloforma enkadrigo estas la t.n. "enlanda" stamposigno (monfareja signo), uzata de Münze Osterreich ekde 1866.

La signo A en neregula sesangula enkadrigo estas la t.n. "eksterlanda" stamposigno por medaloj, uzata de Münze Österreich ekde 1921.

925 = titro de pura arĝento. Laŭleĝe la maksimuma titra mencio estu 925/ 1000, eĉ se la reala titro estas pli alta (999/1000).

*Ni kore dankas Sinjoron Mag. Walter Klag. Krome Sinjorinon Mag. Sabine Deopito de Münze Österreich AG en Vieno, kiu havigis al nia redakcio la informojn en rimarko ses!*

# **René de Saussure** (1868 - 1943)




Profesoro René de SAUSSURE (naskiĝinta en 1868 en Ĝenevo, mortinta en 1943 en Berno) estis svisa esperantisto kaj profesia matematikisto, kiu skribis gravajn verkojn pri Esperanto kaj interlingvistiko el lingvista vidpunkto**. Li nepre estu konsiderata kiel la unua pioniro de esperanta numismatiko!**

Li ankaŭ prezentis projekton pri internacia monosistemo al la Franca Asocio por Progesigo de Scienco. Ĝi estis publikigita en la “Internacia Scienca Revuo” en 1907. La sistemo estis bazita sur la uzo de Esperanto. René tamen ne intencis kaj ne sentis bezonon eldoni monerojn kaj bankbiletojn. Multaj nomoj estis proponitaj por la virtuala monunuo, sed René fine mem elektis la nomon **speso** laŭ monsistemo kiu tiutempe jam ekzistis en Portugalio kaj Brazilo. Celo: transkalkuli la valoron de naciaj valutoj sen uzo de decimalaj ciferoj.

La baza unuo por la praktika uzado iĝis la **spesmilo**.

“1 spesmilo (Sm) = 1000 spesoj (S) = 100 spesdekoj (Sd) = 10 spescentoj (Sc).”




Kiel multaj aliaj tiamaj valutoj la spesmilo estis ligita al ora standardo. Por la valoro de 10 spesmiloj René elektis ok gramojn da oro, laŭ la proporcio 11/12 da oro (= 7,333 da pura oro) kaj  1/12 da kupro.

En aŭgusto 1907 la kongreso de la Franca Asocio por Progresigo de Scienco rekomendis al la Esperanto-asocioj kreon de universala pagilo, ĉar “universala pagosistemo necesas pli kaj pli kaj povas esti tre utila”.

Fontoj:

*“Enciklopedio de Esperanto”, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1986, p. 479*

*Hans Jankowski: “Esperanto-*mono *- Ilustrita historio pri universala monosistemo”, Litovio, 2000, dua kaj kompletigita eldono, p.5-6*

Daŭrigota

**Jen la nova perlo de la numismatika krono de Esperanto!**







Sube la de mag. Andexlinger gravuritaj stampiloj spegulskribe kaj -bilde.





# *T E R M I N A R O*

## *Alfabeta listo (12)*

**florentina bronzo:** *aktuala termino por alojo kiu estas miksaĵo de aluminio aŭ stano (malpli ol 10 %) kaj kupro (pli ol 90 %). Nuntempe ne jam ekzistus kemia formula, ĉar tiu alojo ne estus mondvaste normigita.*

**gipsmuldaĵoj:** *regule faritaj ekde la komenco de la 19a jarcento ĝis proksimume 1970 por dokumenti monerojn, medalojn kaj eĉ prilaborintajn ŝtonojn. Tiaj muldaĵoj ofte estis uzataj por fari fotojn. Pro la ofte ĝena brilado de la metalo kaj pro eventualaj makuloj estas malpli efike por foti la artefaktojn mem. Alia avantaĝo estas, ke la gipsaĵoj havas la saman koloron kaj povas esti fotataj are.*

**ilmono:** *speco de primitiva pagilo. Iloj (en preskaŭ normigitaj formoj) funkciis iam kiel interŝanĝiloj en certaj kulturoj. Silikaj sagopintoj, tranĉiloj kaj hakiloj probable estis la unuaj interŝanĝiloj. Poste aperis bronzaj kaj feraj iloj. Kelkaj ĝis antaŭ nelonge estis uzataj en Afriko. Foje ankaŭ estis farataj samaspektaj miniaturoj. La Ĉinoj, Aztekoj kaj Toltekoj uzis dum jarcentoj tiajn tranĉilajn kaj fosilajn pagilojn.*

**instrumentmono:** *sinonimo por "ilmono"*

**kupro-nikelo:** *alojo el 88 % da kupro kaj 12 % da nikelo(ĝi anstataŭigas la tro multekostan arĝenton).*

**lutjunto:** *la plenigita fendo inter du kunlutitaj metalaj pecoj*

**martelprego:** *pregado pere de muskolforto, kontraŭe al la moderna maŝinprego. Prego per maŝino komencis nur en la 16a jarcento. Dum martelpregado la suba stampilo estis fiksata en amboson aŭ en ŝtipon. Sur tiun stampilon oni sekve metis la pregendan metalon kaj poste la supran stampilon. Per martelo oni bategis sur la supran parton de la stampilo. Por dikaj kaj grandaj moneroj oni devis ripeti la batadon.*

**niobo:** *rara peza metalo, griza kaj tre facile forĝebla. La elementa simbolo Nb anstataŭigis ekde 1950 la iaman Cb (kolumbio). Ĉefe uzata en la metalurgio, tamen ankaŭ por modernaj moneroj (ekz. en Aŭstrio).*

**nordia oro:** *orkolora alojo el 89 % da kupro, 5 % da aluminio, 5 % da zinko kaj 1 % da stano. La eŭro-moneroj de 10, 20 kaj 50 centoj estas farataj per tiu alojo.*

**similoro:** *orkolora alojo konsistanta el 4 ĝis 12 partoj da kupro kaj 1 parto da zinko.*

**tombako:** *sinonimo por nordia oro.*




WISSENSWERTES

# René de Saussure,

## der „Erfinder des universellen Geldes"

### Stelo–Münzmedaille zur 150. Wiederkehr seines Geburtstages

René de Saussure wurde am 17. März 1868 in Genf geboren. Nach dem Studium der Sprachwissenschaft und Mathematik verfasste er sein wichtigstes Werk „Über die Wortbildung im Esperanto". Sein Bruder Ferdinand de Saussure war der Begründer der modernen Linguistik.

1907 publizierte René de Saussure das Projekt einer universellen Währung, die er **„Spesmilo"** nannte. Aus dem französischen Wort „espèce" leitete er „speso" ab. Mil bedeutet 1000. Man unterschied Spesmilo (Sm), spescento (Sc) und spesdeko (Sd). Diese Währung wurde offiziell von einigen britischen und Schweizer Banken verwendet. Außerdem wurde die Ĉekbanko Esperantista gegründet.

Der Spesmilo hatte den Wert von 0,733g reinem Gold und konnte wegen der Goldbindung leicht in andere Währungen umgerechnet werden: 1 Sm = 2 Britische Schillinge = 1 Russischer Rubel = 0,5 US-Dollars = 2,5 Schweizer oder Französische Franken = 2,5 Spanische Peseten.

1942 wurde in den Niederlanden die Universala Ligo gegründet. Diese Organisation trat für die internationale Verständigung und eine universelle Währung ein. Der Name dieser Währung ist der **Stelo** (Stern; Mehrzahl Steloj). 1959 wurden Münz-Medaillen zu 1, 5 und 10 Steloj geprägt, 1965 folgten drei Varianten einer 25-Steloj-Münze. Auch Papiergeld wurde herausgegeben.

Die Steloj eigneten sich sehr gut vor allem für die Überweisung von kleineren Beträgen im internationalen Zahlungsverkehr. Auch diese Münzen und Geldscheine wurden eifrig gesammelt und sind heute sehr gesucht.

2012 gründete Albert Boon in Belgien die Esperanto-Numismatika Asocio. Die Mitgliedschaft ist kostenfrei und kann bei *bert.boon@skynet.be* beantragt werden. Mitglieder erhalten viermal jährlich kostenfrei die Zeitschrift „Esperanta Numismatiko".

Im November 2017erschien erstmals eine Steloj-Münzmedaille in Feinsilber, Nominal 100 Steloj, geprägt von der Münze Österreich AG.




***Die Münzen zu 1 Sm und besonders jene zu 2 Sm waren und sind bis heute begehrte Sammelobjekte und verschwanden daher schnell aus der Zirkulation.*** Foto: Wikipedia




***10 Steloj 1959, weltweites Zahlungsmittel innerhalb der Esperanto-Gesellschaften, geprägt in der Rijksmunt Utrecht auf Veranlassung der Esperanto-Liga.*** Foto: Münzen & Medaillen Deutschland GmbH, Auktion 10 (22. März 2002), Nr. 599, Schätzpreis 30 Euro, Zuschlagspreis 50 Euro




***Im November 2017 erschien erstmals eine Steloj-Münzmedaille in Feinsilber, Nominal 100 Steloj, Masse 1 Unze Feinsilber (31,1 g), Preis 59 € inklusive Zustellung. Geprägt von der Münze Österreich AG. Bestellungen: esperanto@chello.at.***

***R E T P O Ŝ T O***

de vi por ni!

## Reagoj kaj konversacioj

08.10.2017 16:24

Bonan tagon!

Mi estas Sergeo Maksimov, esperantisto el Rusio. Mi interesiĝas pri numismatiko dum du jaroj. Okupante min pri moneroj (de mia kaj aliaj landoj) mi kun ĝojo ekkonis ke ekzistas ENA en la Jarlibro 2013. Trovante plie informon en la reto mi ekkonis ke eblas membriĝi en la Asocio, skribante la leteron al vi. Ĉu eblas fari tion? Mi kun ĝojo konatiĝos kun numismatoj el diversaj landoj kaj helpos al ĉiuj kiuj interesiĝas pri moneroj de mia lando. Dankon!

Amike,

Sergeo Maximov

*08.10.2017 18:31*

*Kara Sergeo Maximov,*

*Ni bonvenigas vin kiel 83an membron de ENA. La membriĝo kaj la revuoj estas senpagaj. Ne ekzistas surpapera revuo!*

*Aldone ni sendas al vi la tri numerojn de la 4a jarkolekto. Sekve vi ricevos ankoraŭ la tri jam aperintajn jarkolektojn (12 numerojn).* ***Bonvolu konfirmi la ricevon de la tuto.*** *La venonta revuo (J4N4) aperos je la fino de oktobro 2017.*

*Dankon pro via aliĝo kaj agrablan legadon. Viaj reagoj, komentoj kaj aldonoj estas ege bonvenaj!*
*Vi skribas, ke vi pretas informi ENA-n pri medaloj el via lando. Nekredeble, sed ĝis nun ni ne trovis esperantajn medalojn el via lando, nek el Sovetunio, nek el Ruslando. Laŭ mi devas ekzisti almenaŭ kelkaj! Do viaj informoj povus riĉigi nian konon pri rusaj esperantaj medaloj kaj aliaj numismatikaĵoj. Dankon anticipe pro via kunlaboro!*

*Ĉar vi estas nia unua kaj nura membro el Rusio, ni esperas ke vi povos varbi aliajn samideanojn en via regiono kaj lando. Dankon!*

*Numismate kaj amike,*
*Bert Boon*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*11.10.2017   17:41*

*Estimata S-ro Schweizer,*

*Mi petas vin trovi por mi portreton, bildon aŭ foton de la en Dresdeno naskiĝinta skulptisto Friedrich Moritz Brodauf (1872-1939). Mi vane serĉis en la Reto.*

*Brodauf estis la kreinto de la probable plej malnova medalo pri doktoro Zamenhof (1909). Pri tiu medalo mi estas verkanta artikolon por la rubriko "Moneroj & Medaloj" de la revuo "Esperanta Numismatiko". Prefere mi laŭkutime aldonas foton de la artisto al la artikolo.*

*Mi evidente volas kompensi la eventualajn kostojn de via serĉlaboro por mi.*

*Mi jam antaŭe sincere dankas vin pro la legado de mia petletero.*

*Altestime kaj numismate,*

*mag. Bert Boon/ Belgio*

16.10. 2017  0:09

Estimata S-ro Bert Boon,

ni vidos kaj respondos en novembro. Ĝis tiam ni estas for de Dresdeno en Prago.

Hubert Schweizer

*16.10.2017   0:24*

*Estimata S-ro Schweizer!*

*Dankon, tute ne urĝas! Mi deziras agrablajn vojaĝon kaj restadon!*

*Samideane,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*11.10.2017   13:30*

*Kara amiko Jozefo!*

*Denove jam pasis preskaŭ tri monatoj post miaj lastaj retmesaĝoj al vi. Apenaŭ kredeble, ke baldaŭ la kvara jarkolekto (kaj entute 16 numeroj!) estos kompleta!*

*Mi do ree petas vian ege aprezatan helpon per provlego de la nova numero. Ne urĝas, ĉar ni dissendos la korektitan version nur je la fino de oktobro.*

*Mi jam nun kore dankas vin kaj esperas renkonti vin venontan jaron dum la UK en Lisbono.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

19.10.2017 11:19

Kara Bert,

jen la nova ENA-revuo kun miaj korektoproponoj.

Por mi tre gravas la unueca aspekto de la revuo, tial mi refoje rekomendas al vi kaj Vivienne uzi la normon "Monato-konvencioj", kiun mi nun kunsendas. Bedaŭrinde en Esperantujo ekzistas pluraj "normoj", tamen se oni volas esti konsekvenca, oni uzu nur unu. Tial estus tre bonvene sekvi konsekvence la vaste konatan kaj uzatan Monato-konvenciojn.

Aliĝante al la "reformproponoj" de Elda Doerfler, mi rekomendus citi nur la vere gravajn kaj esencajn tekstopartojn de la retmesaĝoj. Pri dankoj kaj salutoj verŝajne malmultaj homoj scivolas. Tiel oni povus pli unuecigi kaj konformigi la retmesaĝojn al la revua aspekto kaj samtempe senbalastigi ĝin.

Amike salutas vin Jozefo

*21.10.2017 11:43*

*Karaj Jozefo!*

*Kroman dankon pro la sendo de la MONATO-konvencioj. Ekde nun ni uzos ilin kiel gvidilon por la revua tipografio.*

*Amike kaj numismate*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

16.10.2017 15:23

Kara Bert!

Jen letero el la nova, tre vizitinda historia muzeo en Frankfurt am Main. Ĝi remalfermiĝis la sepan de oktobro 2017 post 10-jara alikonstruado.

Tie ili konas la „Esperanto-monon“!

Salutas Walter

*16.10.2017   23:26*

*Kara amiko!*

*Vi ja scivolemigis min koncerne la muzeon. Kiujn esperantajn monerojn vi tie vidis? Ĉu ili ankaŭ posedas Esperantajn medalojn?*

*Tute alia afero…ĉu vi jam konsciis, ke via eksterordinara 100 steloj-pagomedalo estas la unua Esperanta numismatika artefakto en la historio de Aŭstrio kaj krome la unua aŭstria numismatika artefakto en la historio de Esperanto? Almenaŭ mi ĝis nun ne trovis alian, ankaŭ ne en la broŝuroj de Hans Jankowski, laŭ mi ankaŭ vera pioniro de la esperanta numismatiko!*

*Ĝis baldaŭa reskribo.*

*Amike,*

*Bert*

18.10.2017   14:24

https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo

Salutas Walter

31.10.2017   9:16

Kara Bert!

Ĵus mi ricevis 400-paĝan katalogon de la Viena aŭkciejo Dorotheum „Moneroj kaj Medaloj“.

Sur paĝo 361 aperas bildoj de la nova 100-stela arĝenta monero-medalo.

La aŭkcio okazos ĵaŭde, la 16an de novembro 2017 ekde la 14a horo.

La aŭkcio rete:

https://www.dorotheum.com/auktionen/aktuelle-auktionen/kataloge/list-lots/auktion/12826-munzen-medaillen-und-papiergeld.html

Enmetu: Esperanto

Pliaj informoj:

https://www.dorotheum.com/ueber-uns/das-unternehmen.html

michael.beckers@dorotheum.at

norbert.helmwein@dorotheum.at

Mi kunsendas du fotojn.

Salutas Walter

Mag. Walter KLAG
Journalist und Herausgeber
Fachdelegierter des Esperanto-Weltbundes für Numismatik. Neu: 1 Unze Feinsilber, 59 €

27.12.2017 14:55

La stelo-mono vivas!

La 9-a Junulara Esperanto-Semajno JES okazas de la

26-a de decembro 2017 ĝis la 2-a de januaro 2018 en Szczecin (Pollando).

Tie oni povas pagi per steloj, la mono de la Esperanto-komunumo.

Tiu evento estas unu el multaj internaciaj kongresoj, dum kiu oni povas pagi per steloj.

Aktuale oni uzas monerojn el plasto, kies nominalo estas unu, tri kaj dek steloj. Ili pregiĝis 2012, la eldonkvanto estas po 3000.

En Wikipedia commons oni povas admiri 32 bildojn de stelo-moneroj:

https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo

La iniciatoro de la universala mono estis la sviso René de Saussure:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Ren%C3%A9_de_Saussure

https://en.wikipedia.org/wiki/Ren%C3%A9_de_Saussure

Okaze de lia 150a naskiĝdatreveno aperis ĵus 100-stela arĝenta monero.

Alkroĉita: stelo-tabelo

Salutas Mag. Walter Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio, esperanto@chello.at

Postrimarko 1: Mi ĝojus pri eventuala komentario aŭ korekto.

Postrimarko 2: Haveblas senpaga dulingva broŝuro (germana-esperanta) pri la temo. Se vi volas havi ĝin, sciigu al mi vian poŝtan adreson.

## STELO-TABELO 2018 01

| Nominalo | Materialo | Maso | Dia-metro | Jaro | Eldon-kvanto |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 stelo | Bronzo | 3,4 g | 20 mm | 1959[1] | 10 000 |
| 5 steloj | Latuno | 5,0 g | 23 mm | 1959[1] | 10 000 |
| 10 steloj | Cu – Ni | 9,0 g | 28 mm | 1959[1] | 10 000 |
| 25 steloj | Cu-Ni 75-25 | 19 g | 37 mm | 1965 | 1000 |
| 25 steloj | Ag 0,900 | 25 g | 37 mm | 1965 | 5000 |
| 25 steloj | Au 0,983 | 50 g | 37 mm | 1965 | 10 |
| 1 stelo | Plastoruĝa | 0,8 g | 23 mm | 2012 | 3000 |
| 3 steloj | Plastoflava | 0,9 g | 25 mm | 2012 | 3000 |
| 10 steloj | Plastoverda | 1,3 g | 29 mm | 2012 | 3000 |
| 100 steloj | Ag 0,999[2] | 31,1 g<br>1 unco | 37 mm | 2018[3] | 1000 |
| 50 steloj[4] | Ag 0,999[2] | 15,6 g<br>½ unco | 34 mm? | 2019? | 1000? |
| 10 steloj[4]<br>5 steloj[4]<br>1 stelo[4] | Nordia oro | 1 unco<br>½ unco<br>⅓ unco | 38 mm?<br>35 mm?<br>32 mm? | 2020? | 1000? |

Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.

Nordia oro ne estas oro, sed alojo el 89 % Cu, 5 % Al, 5 % Zn kaj 1 % Sn.

La 10-, 20- kaj 50-eŭrocendaj moneroj konsistas el nordia oro.

Rimarkoj kaj korektoj bonvolu sendi al esperanto@chello.at

[1]Pregitaj en la jaro 1960
[2] La monero konsistas el 999/1000 da Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.
[3]Pregita en la jaro 2017
[4]Projektoj

*28.12.2017   17:33*

*Saluton Walter!*

*Ĉu vi intencas uzi buston por la 50-stelo? Mi posedas belajn ne-kolorajn fotojn sur poŝtkartoj de Julia Isbrücker kaj de Andreo Cseh.*

*Ĝis reskribo!*

*Bert*

28.12.2017   18:06

Estas du problemoj: monero-medalo kun busto aŭ kapo kostas multe pli, kaj la rezulto estas ofte ne kontentiga. Tial mi rezignis ĉe la 100-stelo pri kapo.

La stampiloj – vidu la alkroĉitan foton – kostis 3348 €, kun kapo eventuale la duoblon. Oni devas fari gipsmodelon kaj tiel plu.

Mi ne havas patenton eldoni tiajn pregaĵojn kaj mi tre ĝojus, se ankaŭ aliaj aktivus tiukampe.

Nun mi atendas, ĝis la duono de la kapitalo estas reveninta.

Kore Walter

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

08.01.2018   15:44

Kara Bert,

dankon pro via intereso. Dank al firmao en Belgio ni povis akiri 3.000 verdajn "plastmedaletojn" (Herzberg - la Esperanto-urbo) kun verda stelo.

Bronzaj medaloj momente ne plu eblas, ĉar sinjoro Güttler estas jam maljuna kaj tre malsana, bedaŭrinde.

Ĉu vi foje vizitos nin? Ni povos havi specialan fakseminarion, ankaŭ por klerigaj celoj.

Kiu/j dato/j  taŭgos por vi ? Ĉu ekzemple komence de oktobro 2018?

Intertempe niaj kolektajoĵ ja ankaŭ kreskis kaj ni preparas nemalmultajn fakarkivaĵojn.

Gratulon pro via konstanta esplorlaborado!

Amike salutas

Petro kaj Zsofia

08.01.2018 18:10

Karaj Zsofia kaj Petro!

Unuavice multan dankon pro via rapida respondo. Vere taŭga iniciativo de vi ambaŭ kaj efika reklamilo por via agado en Herzberg! Mi tutkore gratulas!

En 2018 Vivi kaj mi vizitos Lisbonon kaj partoprenos evidente en la 103a UK. Plie ni gastigos geamikan familion el la najbareco de Karlsruhe (Ötigheim) en oktobro aŭ novembro. Do en nia aĝo tio sufiĉos por unu jaro!

Tamen, ni jam priparolis la eblecon viziti denove vian belegan kaj etosagrablan urbon, eble en septembro 2019, kiam ĉe vi la vetero estas kutime ankoraŭ bela. Kompreneble mi estus preta prelegi kun lumbildoj pri la esperanta numismatiko kaj la projektoj de ENA.

Vi scivolemigas min koncerne viajn novajn kolektaĵojn, ĉefe pri novaj numismatikaĵoj.

Mi bedaŭras, ke sinjoro Güttler fartas malbone. Se eble bonvolu saluti la geedzojn Güttler kaj deziri al li baldaŭan resaniĝon. Liaj kvin medaloj en mia vitroŝranko ĉiun tagon karesas miajn okulojn!

Amike kaj numismate,

Vivi kaj Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

# *A N O N C O J*


# *&*


# *E V E N T O J*

La 103-a UK

Lisbono — Portugalio

28 de julio — 4 de aŭgusto 2018






*Kun danko al nia membro Walter Klag!*

---

18.12.2017: 100 steloj en la angla: https://steemit.com/esperanto/@johano/esperanto-money

*Ankaŭ sendita de Walter Klag*

---







*Kun danko al nia membro Herman Deceuninck!*

---

# Esperanto-Kongresoj por gejunuloj

Internacia Junulara Kongreso IJK

Somera Esperanto-Studado
SES

Junulara Esperanto-Semajno
JES

Klaĉ-Kunveno Post-Somera
KKPS

Franca Esperanto-Semajno
Terure
Organizita
FESTO







| |
|---|
| 1 eŭro = 4,147 steloj.<br>Dum kelkaj el tiuj eventoj oni kalkulas per steloj |

*Kontribuaĵo de Walter Klag*

# Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur kvar jaroj ĝis 83 individuaj membroj kaj 19 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi LAŬPETE tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj senpete sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2017 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"